

do, fungicido, insekticido k.a. Ne koninte la morfologion de ĉi latinaj vortkombinaĵoj, li opiniis, ke sufiĉas aldoni la ŝajnsufikson "icido" al koncerna Esperanto-radiko. Sed fakte tiu "icid" konsistas el la kunliga morfemo "i" kaj el la latindevena "cid" (*caedo, caedere, cecidi* = mortigi). Ĉar la helendevena prefikso "bio-" finiĝas vokale, la kunliga morfemo "i" antaŭ "cid" ĉi-okaze ne estas aplikata; ĝi ja liverus ne pli facilan prononcon, sed male, ĝenan vokaltriopon. La ĝuste formita vorto estas do **biocido**. En Esperanto ne plu temas pri duradika kunmetaĵo, sed pri unusola radiko nedividebla: biocid-. Same herbicid-, fungicid-, fitoncicid- k.t.p. ne estas divideblaj. La laste nomita vorto povas servi kiel ekzemplo, ke iam la kunliga morfemo "i" forestas, kvankam la antaŭa vortparto finiĝas konsonante.

Alia ripreninda afero: En la traktaĵo de 1971 (p. 113) troviĝas proksime apud la ĥemielementa nomo "kromio" la mineralnomo "ĥromito". Jen tiu pa demonstraĵo, kiel senorda fariĝus la Esperanto-leksikologio, se oni procedus tro arbitre. Kelkaj ĥemiistoj, por eviti la homonimecon inter la elementnoma radiko "krom-", kaj la prepozicia radiko "krom-", elpensis la novan radikon "kromi-" forgesinte, ke la origina helendevena fonetiko de "ĥrom-" pli nature evitus la nedezirindan homonimecon, sed tio, ke dstruiĝu la perfekte internacia leksikologia kohereco de la sennombraj "ĥrom-" vortoj (kp. *J. Kavka*: La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. — SAEST, 1980, 93-100. En Esperanto temas pri t.n. **ĝemelaj radikoj**: ĥrom-, ĥromat-, ĥromit- k.a., ĉiuj derivitaj de la helena $\chi\rho\omega\mu\alpha$ = koloro. La misa vorto "Kromio" povas servi ankaŭ kiel pruvo, ke ne sole unufakuloj kompetentas pri siafaka terminologio, sed ke devas intervenadi superfaka lingva instanco, kiu gardas koherecon de la vorttrezoro. Tio validas por ĉiu nacia lingvo kaj tiom pli por la planlingvo, kiu devas esti laŭeble pli konsekvenca kaj pli regula.

Ankoraŭ pri alia mineralnomo (samartikole, sampaĝe): "ĥalkosino". Se temas pri intervokala "s" en *Gr, La, De, Fr* kaj multaj aliaj lingvoj, oni prononcas "z". Tiaj vortoj en Esperanto aperas kun "z": krizo, analizo k.t.p. Do: *ĥalkozino*, ne "ĥalkosino".

J. Kavka

Protokolo pri la jarkunveno de ISAE

Okazinta dum la 65-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo, vendredon la 8-an de aŭgusto 1980 en la ĉambro Sinha.

Prezidis prof. d-ro *C. Stóp-Bowitz*, vicprezidanto de ISAE, protokolis *F. Simonnet*. Ĉeestis parton aŭ la tuton de la kunveno 21 personoj: prof. *H.A. Alikoski*, inĝ. *R. Clerici*, s-ino *D. Deneva*, s-ro *M. Dobrzyński*, prof. *H. Frank*, s-ro *T.A. Hoeg*, prof. *M. Landmark*, s-ro *A. Lukács*, inĝ. *J. van der Marel*, s-ino *C. Nourmont*, prof. *L. Oterma*, d-ro *J. Pool*, inĝ. *P. Provrez*, prof. *O. Reiersól*, d-ro *P. Rizzo*, s-ino *M. Sawedo*, prof. *V. Setälä*, s-ro *J. Setréus*, s-ro *F. Simonnet*, prof. *C. Stóp-Bowitz*, s-ro *Zhang Qi Cheng*.

1. Internacia Kibernetika Asocio

En la komenco de la kunveno, prof. *Frank* prezentas Internacian Kibernetikan Asocion, kies estrarano li estas, kaj ties lingvan situacion: ĝi uzadas la anglan kaj la francan, sed la Internacia Lingvo estis allasata prove por la venonta Internacia Kibernetika Kongreso (okazonta en *Namur*, Belgio, 8.-13. sept. 1980). Membrokunveno, okazonta fine de la kongreso, devos decidi pri propono, definitive elekti la Internacian Lingvon kiel unu el la oficialaj laborlingvoj de la asocio. Li alvokas aliĝi al IKA kaj partopreni en la membrokunveno.

2. Raportoj kaj superrigardo

Prof. *Stóp-Bowitz* konstatas, ke li estas la ŝola ĉeestanta estrarano de ISAE; li prezidas la kunvenon laŭ peto de la prezidanto, prof. *Kawamura*, kiu lastmomente, pro profesiaj devoj, estis malhelpata iri al la Universala Kongreso.

Donacu al viaj amikoj
kaj al vi mem la altnivelan

sciencia revuo

Jus aperis n-ro 133. Ĝis la fino de 1981 aperos n-roj 134, 135, 136, kaj ĝis la fino de 1982 n-roj 137 ĝis 144.

Abonkotizoj estas:

16 svisaj frankoj	por volumo 30 (n-roj 133 kaj 134)
20 svisaj frankoj	por volumo 31 (n-roj 135 kaj 136)
20 svisaj frankoj	por volumo 32 (n-roj 137 ĝis 140)

Sciencia Revuo estas abonebla ĉe via Landa Delegito de ISAE, aŭ ĉe UEA, aŭ rekte ĉe:

«Sciencia Revuo», Edistudio, c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo, pĉk 12230561 [1 sv.fr. = 600 it.liroj; pagante per banko aŭ ĉeko aldonu 2 000 lirojn pro bankaj kostoj]

isae

internacia sciencia asocio esperantista

Prof. *S-B* voĉlegas saluton de la prezidanto, raporton de la ĝenerala sekretario d-ro *Kavka* kaj kasraporton 1978-1979 de la sekretario-kasisto d-ro *Zázvorka*, kun komentarioj pri kotizoj.

Post aprobo de tiuj dokumentoj, prof. *S-B* prezentas superrigardon pri la situacio de ISAE. Volumon 29 (1978) de ST oni presigis de s-ro *Bays* en Brazilo. ĉar en Ĉeĥoslovakio ne eblis kolekti la kotizojn, s-ro *Bays* fariĝis administranto de SR. Bedaŭrinde, ne ĉiuj landaj delegitoj transpagis la kolektitajn monsumojn al li. Kelkaj pagis al UEA aŭ al aliaj adresoj, kelkaj atendis. Iom post iom, la sekretario-kasisto perdis superrigardon pri la pagitaj aŭ pagendaj sumoj. La konfuzo pligrandiĝis precipe tial, ke mem la SR-administranto longtempe ne informis d-ron *Zázvorka* pri la situacio. Finfine li decidigis, ne plu labori super SR, ĉar ISAE ŝuldas al li 1810 us. dol. UEA deklaris sian emon helpi, sed pro administraj formalajoj ankoraŭ ne povis fari konkretan decidon.

Prof. *S-B* opinias, ke ISAE devas laŭeble baldaŭ finpagi al *Bays*. Dume li interkonsentis kun *B. Casini*, kiu, se ISAE aprobos, estas preta aperigi la revuon eĉ pli malmultekoste ol *Bays*.

3. Ĝenerale pri SCIENCIA REVUO

D-ro *J. Pool* opinias, ke faka revuo pri ĉiuj sciencoj liveras artikolojn nur parte kompreneblajn kaj interesajn por unuopa leganto. Pli utila estus manuskripta banko ĉiufaka kaj/aŭ revuo popularsciencia. Prof. *S-B* respondas, ke la estraro konscias, ke ĝeneralsciencia revuo ne plu estas idealo kaj ke oni celas al situacio, en kiu aperadu apartaj fakaj revuoj kaj SR fariĝu superflua, sed ankoraŭ la esperantistaj sciencistoj estas tro malmultaj. MATEMATIKO TRANSLIMEN, LA MEVO, MEDICINA INTERNACIA REVUO, GEOLOGIO INTERNACIA k.a. estas komenco en la ĝustan direkton. Cetere, SR jam estas iagrade popularsciencia.

Prof. *Frank* raportis pri vanaj klopodoj por akiro de SR. Nun li eksciis kun ĝojo, ke ĝi ne estas tro specialigita. Tial li ne komprenas la celon de INTERFAKE. Prof. *S-B* respondas, ke je la jarfino okazos elekto de nova estraro de ISAE, kiu laboros por reordigo de la asocio kaj de SR. Li klarigas la miskomprenon pri INTERFAKE, kiu estas nur administra bulteneto de UEA kaj forumo por kunlaboro inter la ĉiuspecaj fakaj asocioj.

4. Kiu estas kiu en scienco kaj tehniko?

Prof. *Frank* raportis pri interkonsento inter adv. *Georg Winkler*, kiu eldonos la verkon, kaj Eŭropa Klubo, kiu kompostos ĝin. Ili ne sciis, ke temus pri eldonaĵo de ISAE, sed prof. *Frank* salutis kunlaboron. Prof. *S-B* respondas, ke la komenca ideo estis, ke oni uzu la nomon de ISAE por doni aspekton de seriozo. ISAE subtenis la petskribon de la kompilanto, inĝ. *Christian Darbellay*, al Institucio Hodler, kaj la ricevita monsumo utilis por la unua cirkulero kaj por la afranko. Ankaŭ li salutas la kunlaboron kun Eŭropa Klubo. Evidente rezultas harmonia interkonsento.

5. Membrolisto laŭfaka. — Kuranta bibliografio

Prof. *Olav Reiersøl* proponas, ke ISAE kompilu membro-matrikulon kun mencio de la profesio kaj de la scienca fako, ĉar estus utile scii, kiuj samfakuloj ekzistas, kaj tia listo ankaŭ estus grava helpilo en varbagado; li proponas ankaŭ en SR listigi ĉiujn sciencajn publikigaĵojn aperantajn aliloke. Prof. *S-B* respondis, ke matrikulo ekzistas ĉe la sekretario-kasisto kaj ke la estrato planas kompili novan; la duan proponon li notas. S-ro *Lukács* atentigas, ke BUDAPEŝTA INFORMILO klopodas konstante informadi pri la aperintaj sciencaĵoj esperantlingvaj.

6. Internacia Asocio de Esperantistaj Psiĥologoj

S-ino *Nourmont-Moon* miras pri informo pri fondo de tia asocio, aperinta en revuo ESPERANTO. La informo estas troiga, temas pri fondiĝonta asocio, kiel faka sekcio de ISAE, kiu kunlaboros i.a. en la terminologia laboro. Prof. *S-B* rimarkigas, ke asocio povas esti samtempe memstara kaj faka sekcio de ISAE.

7. Kunfando de esperantaj periodaĵoj

S-ro *Lukács* proponas, fari el SR sciencpopularigan revuon sufiĉe altnivelan kun specialaj numeroj por difinitaj faktoj. Li memorigas proponon, faritan de prof. *Ottó Haszpra* en Lucerno pri kunfando de la ekzistantaj esperantaj sciencaj publikigaĵoj SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ, SR. MATEMATIKO TRANSLIMEN k.t.p., kiu povus aperadi "rotacie" en diversaj landoj. Oni pretus ŝanĝi la nomon de SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ al SR. Prof. *Ha-*

szpra iros baldaŭ al *Praha* kaj povus tie diskuti la ideon kun d-ro *Kvaka*. Prof. *S-B* respondas, ke tian proponon devos konsideri la nova estraro elektota aŭtune.

8. Eventuala kunlaborado kun CED

D-ro *Pool* atentigas, ke oni devus pensi pri eventualaj eblecoj por kunlaborado. Ankaŭ CED interesiĝas i.a. pri internaciaj sciencaj aferoj. Pri tiu temo, pri kiu ĝis nun estis malfacile akiri bonajn artikolojn por LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVOPLANADO, eble membroj de ISAE povus proponi artikolojn. Li petas, ke oni rekomendu al sciencaj bibliotekoj abonon al LPLP.

9. Estonta estraro de ISAE

Prof. *S-B* demandas, ĉu inter la ĉeestantoj aŭ per ilia helpo estus eble trovi kandidatojn por la nova estraro. Ekzistas unu persono, kiu duone promesis kandidatiĝi kiel ĝenerala sekretario, mankas kandidato kiel sekretario-kasisto. Aŭdiĝis kelkaj nomoj, sed aperis nenio definitiva.

10. Diversaĵoj

Prof. *Margrete Landmark* demandas, ĉu sufiĉe da manuskriptoj por SR. Laŭdire d-ro *Kavka* ne havas problemojn tiurilate. Aŭdiĝis deziro, ke la prelegoj de ISU denove aperu en SR.

Prof. *Alikoski* disdonas revuon kun artikolo pri prof. *Y. Väisälä*, prezidinto de ISAE, kun resumo en Esperanto.

Prof. *S-B* dankas al ĉiuj, fermas la kunsidon kaj petas, ke oni ne timu sendi al li proponojn (ankaŭ pri si mem) por novaj estraranoj.